# *Rifuzas la ministro pri eksteraj rilatoj novajn punregulojn de Usono*



La ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez Parrilla rifuzis hodia? la novajn punregulojn anoncitajn de Usono kontra? sep institucioj de la kariba insulo.

La? deklaroj de la ministro, la punreguloj anoncitaj de la ?tata sekretario Mike Pompeo estas “desegnitaj por dama?i la kubajn familiojn”, kaj anka? taksis “hontinda kaj krima la fortigon de la sie?o  kadre de la Covid-19”.

Inter la sep entreprenoj punataj estas la financa institucio Fincimex, tri hoteloj, du centroj de plon?ado kaj mara parko por turistoj, la? prezicigis Telesur.

Tiamaniere, la listo de establoj  kubaj punitaj de la usona registaro estas pli ol 200 institucioj kaj subinstitucioj de la kariba lando.

La kuba registaro taksis arbitra tiun liston  formitan  de diversaj institucioj supozate ligitaj al la sektoro de defendo kaj nacia sekureco.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/especiales/exclusivas/224703-rifuzas-la-ministro-pri-eksteraj-rilatoj-novajn-punregulojn-de-usono

**Radio Habana Cuba**